


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



Okaze de la 14-a IFEF-kongreso estis lokigita dulingva  
marmortabulo en la groto Aggtelek

4

----- 64-a jarkolekto  
2020



## HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado  
en Hungario  
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapest

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

\*

### MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

## ENHAVTABELO:

62. I. Gulyás: La dua ondo
63. I. Gulyás: Defendo de la klimato
64. I. Gulyás: Nia fiero
67. L. Gabalda: La 6-a Esperanto-staĝo
69. G. Márkus: Kial Eŭropo ne povas kontroli la Covid-19
72. I. Gulyás: Historio de la HFEA (Dua parto)
76. I. Gulyás: Virino kaj viro
77. I. Gulyás: Ekskurso al Estonio

64-a jaro N-ro 4, OKTOBRO - DECEMBRO

## LA DUA ONDO

Ni ne devis multajn atendi, kaj alvenis la dua ondo de la koronaviruso. Tiu ondo estas ankoraŭ pli kruela ol la unua. Kompreneble tiu viruso disvastiĝas en la tuta mondo, kaj ĝi ne indulgas ankaŭ la esperantistojn. Vane ni povas kalkuli, kiam ni povos organizi renkontiĝon, kongreson kaj aliajn kunvenojn, la viruso ne zorgas pri niaj planoj kaj imagoj. Do ni devas alĝustiĝi al la viruso, kaj ni devas serĉi novajn rimedojn kaj eblecojn daŭrigi niajn movadajn laborojn. Momente la „virtualaj kongresoj”, „rete kunsidoj”, „videoprelegoj” k.a. helpas al ni por daŭrigi niajn agadojn, sed tiuj metodoj nur momente solvas la problemojn. Ĉu ĝis kiam? Eblas ke venas la tria, eĉ kvara ondoj de la koronaviruso. Ĝis kiam ni povos fari tiun aktivecon? Mi jam perdis mian optimismon, kion fortigas la longtempa kvaranteno, la malpermeso de la libera movo, la konstanta sento de la enŝlosiĝado ktp. Vere mankas al mi miaj esperantistaj geamikoj, la ĝojo de la kunestado, la etoso de la kongresoj kaj aliaj kunvenoj, la libere vojaĝoj al eksterlandoj k.a. Ĉe ni ekzistas iu proverbo: „La malriĉulo kuiras kun akvo”. Tio signifas, ke ni devas esti optimistaj, kaj akcepti eĉ eluzi la okazon, kion la nuna vivo donas al ni. Mi denove ŝatus akcenti, ke la pandemio estas danĝera afero, kaj pozitive eluzi la eblecojn estas la plej grava tasko por ni. Mi diras ankaŭ al mi mem, ke ni atendu pacience la finon de la pandemio, kaj poste kun renoviĝanta forto ni daŭrigu nian Esperanto-aktivecon.

István Gulyás

## DEFENDO DE LA KLIMATO

La kalendaro jam montras la 2020 jaron. La mondo, kaj en ĝi Eŭropo estas ĉirilate en la lasta horo. Ni devis lerni novajn esprimojn kaj nociojn, kaj ni komencis uzi tiujn, kiel la diĝitigo, aŭtomatigo, industria revolucio, ŝanĝo de la klimato, medioprotektado, demografia krizo, pandemio, migrado ktp. El inter tiuj esprimoj mi ŝatus ekzameni la klimaton kaj la medioprotektadon.

La ŝanĝo de la klimato signifas la daŭran kaj laŭgusta mezure aliformo de la vetero en loka kaj globala nivelo. Tiu ŝanĝo povas disvastiĝi al la meznombra temperaturo, pluvo aŭ ventomaniero. En la komenco de la nuna jarcento ni aŭdis unuafoje pri la „El-Nino fenomeno”, kaj ni parolis tiam, ke io ŝanĝiĝis en la vetero de la mondo. La vintroj estiĝis pli mildaj, la someroj pli varmegaj kaj sekaj. Laŭ la antaŭsigno tiu tendenco daŭras. Pro la ŝanĝo de la klimato grandparte estas la respondeca elemento la karbona dioksido (CO<sub>2</sub>). La plej grandaj eligantaj sektoroj en la mondo estas la kurentproduktado, industrio, agrokulturo kaj la trafiko. La globala trafiko dependas pr. en 90%-j de la oleo. Pro tio la trafiko respondecas pri la 30%-j de la eliganto de la karbona dioksido. El tiu eliganto apartenas 10-10%-j al la navigacio kaj aertransporto, 40%-j al la ŝarĝtransporto, kaj ankaŭ 40%-j al la personaj aŭtomobiloj. La Eŭropa Unio ligis sin per promeso en la malpliigo de la eliganto de la karbona dioksido al 60%-j.

La fervojo estas la plej medioindulga transportsektoro, ĉar estas malalta la eliganto de la gazoj kaj oleoj, kaj la uzado de fuelo estas la plej efektiva. Laŭ la indikoj de la pasintaj tempoperiodoj 7,6%-j de la pasaĝertrafiko, kaj 17,4%-j de la vartrafiko okazis per fervojo en la Eŭropa Unio.

La plifortiĝo de la medioprotektada vidpunkto kunportas la la renesancon de la fervoja trafiko. La jaro 2021 estos la jaro de la fervojo en la Eŭropa Unio. En la kadro de tiu ĉi ebleco ĉiuj eŭropaj fervojoj devus dediĉi pli grandan atenton al la defendo de la klimato, kaj la medioprotektado. Mi pensas, ke grandajn celojn la fervojoj povas atingi nur en longa perspektivo. Pro tio EU kaj en ĝi la Hungaraj Ŝtatformoj planas la eliganton de la karbona dioksido malpliigi en pleja pleno ĝis la jaro 2050.

MÁV pretigis medioprotektan strategion, kies celo estas difini la plej gravajn medioprotektadajn tendencojn por la negativaj medioefikaj aktivecoj, kaj ŝarĝojn de la natura medio. La strategio okupiĝas pri la mediokonsciado pere de la sistemaj perfektigaj kursoj sur la tereno de la medioprotektado kaj pri la kreskado de la jura medio. La alia grava funkciado estas la akcelado de la energiaŝparemo. La internacia energiaŝparema monda tago estas la 6-a de marto, kiam oni helpas konscii, ke ni havas nur unu Teron, kaj ni ne malŝparu ties trezorojn.

Ankaŭ estas grava temo en la kadro de la medioprotektado, la akvo. La 22-an de marto estas la monda tago de la akvo. Kion diris pri la akvo Antoine de Saint-Exupéry: „Akvo vi ne havas guston, aromon, oni ne povas determini vin, oni gustumas vin sen ekkono. Vi ne estas necesa, vi estas mem la vivo!” En la pasintaj jardekoj eĉ jarcentoj la homoj malpurigis la riverojn, oni plenigis ĥemiaĵojn la purakvajn fontojn, en la oceanoj degelas la glacimontoj, eĉ naĝas la plastomontoj. La defendo de la kompleto de la trinkakvo kaj la akvoprenejoj, taŭgaj kaj efikaj kloakpurigaj instalaĵoj estas la intereso de la homaro.

**István Gulyás**

## NIA FIERO

En la hungara magazeno „Surprizo” aperis raporto pri nia eminenta, entuziasma kaj inteligenta membro **Elizabeto Ködmön**. Ni ĉiuj nomas ŝin Elinjo, ĉar ŝi meritas la karesnomon pro sia aktiveco kaj afableco. Ŝi estas multflanka homo, kiu konstato estas



ellegita el la raporto. Mi plurfoje legis tiun raporton, kaj ĉiufoje mi trovis novajn kaj interesajn konstataĵojn kaj pri siaj privata kaj esperantista vivo. Ŝi estas jam delonge la motoro de la Esperanto-agado en urbo Tata, ŝi estas la sekretario de la „Asocio de Tata kaj ties Regiono”. Tiu asocio estas la membroasocio de la „Hungara Fervoja Esperanto-Asocio”, kaj nombras pli ol 200 esperantistojn. Ŝi regule organizas kun helpantoj „Landan Amikan Fervojistan Renkontiĝon”. Ŝi estas fondinto de la „Belarta Societo de Tata”, en kies kadro la membroj pentras bildojn, aranĝas ekspoziciojn el tiuj pentraĵojn

ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande. Ŝi partoprenis la establaron de la „Esperanta Ĥoro en Tata”, kaj instruas multajn membrojn tie. Estas malfacile denombri kaj vicigi tiujn aktivecojn, kiujn ŝi delonge faras, sed en la raporto oni povas prezenti ankoraŭ kelkajn aktivecojn. Jen la raporto:

### „Mi estas la gardisto de la landa Esperanto-movado.

Ne estas troigo por deklari, ke la landa gardisto de la Esperanto-lingvo estas sinjorino Elinjo Ködmön. El ŝiaj rakontoj malkovras: Ĉefe povas danki al ŝi, ke el la speciala kaj facile lernebla lingvo oni rajtas fari ŝtate rekonitan lingvoekzamenon. La signifo de la



Ŝia pentraĵo

vorto Esperanto estas 'Reménykedő'. Kiam ni alvenis al Tata, kaj Elinjo malfermis la pordon de sia domo en la ĝardenurba strato, okaze de la sin prezento mi pensadas, ke estas vera tiu prezentado. La hungara ĉefdelegito de la 'Universala Esperanto-Asocio' en la lastaj tagoj atingis la 85-a jaraĝon, sed el ŝi radias sereno de juna virino, kiu havas sonĝojn, planojn kaj celojn. Dum la akompano al sia domo, ŝi fabelis ridete, ke la uzado de la optimista lingvo dum la tuta vivo influas sian vivkoncepton.

### El scivola knabineto iĝis ĉefdelegito.

Mi scivole demandas Elinjon: kial ŝi dediĉis sian vivon al la lingvo Esperanto. Elinjo fabelis: „Miaj gepatroj estis sikuloj, kiuj ankoraŭ antaŭ mia naskiĝo vivis kaj laboris dum kelkaj jaroj en Francio. La direktoro de la konstruindustria entrepreno instruis la laboristojn pri la facilelernebla lingvo Esperanto, kies gramatiko ankaŭ estas simpla, por ke la komunikado estu pli facile. Miaj gepatroj enamiĝis al tiu neutrala lingvo, kiun oni parolis en la tuta mondo,

*kaj post ilia hejmeniro, poste transloĝiĝo al Hungario, ili plu ekzercadis la lingvouzadon. Kiam mi naskiĝis mia patro jam korespondis kun la esperantistoj en la 'duona mondo', ĉar li*

*estis filatelisto. Mi memoras el mia infanaĝo pri Esperanto kiel samspeca sekreta lingvo. Miaj gepatroj kun iliaj geamikoj parolis tiel, se pri tiu temis la parolo, kion la oreloj de la knabineto ne permesis aŭdi. Komprenoble mi diligente notis la ekkaptitajn vortojn, ĉar kun senfina ekscito komprenis la temon. Poste en 1962 komencis Esperanto-kurso en urbo Tata, mi tuj kuris por aliĝi. Bedaŭrinde nia instruisto, la iama staciestro, en la duono de la kurso subite mortis en koratako. Mi ne volis tion, ke nia urbo restu sen Esperanto-instruado. Mi nur du lecionojn antaŭ lernis la Esperanton kiel la aliaj, tamen decidiĝinte mi komencis instrui ilin, kaj finfine la tuta grupo faris sukcesajn bazgradajn lingvoekzamenojn”.*

Tiel komencis la historio de Elinjo, kiu poste atingis superlativan lingvoekzamenon. Ĉar la Esperanto kunigis la amantinojn de la lingvo, Elinjo iĝis la membro de la prezidanteco de la Hungaria Esperanto-Asocio. Poste ŝi iĝis la ĉefdelegito de la hungaraj esperantistoj, kaj tiujn rolojn de tiu tempo ŝi plenigas.

### **Multaj povas danki al ŝi la diplomon.**

Elinjo estis sociala asekurada fakulino en ĉefa pozicio, sed samtempe ŝi ĉiam instruis la lingvon Esperanto. Multaj studentoj povas danki al ŝi la lingvoekzamenon, inter ili kelkaj vivis kun gravaj disleksioj. Laŭ Elinjo tiuj studentoj facile ellernis la Esperanton, kiu estis iliaj unusolaj ŝancoj, por ke ili havu lingvoekzamenon kaj per tio ankaŭ la diplomon.



*Kun la Nacia Aktorino Marinjo Töröcsik*

*„Estis tempo, kiam kvin studentoj ekzamenis el germana lingvo, kaj samtempe ducent el Esperanto. Tiu fakto pikis la okulojn ĉe la tiama*

*gvidado de la instruado, pro tio ili volis aranĝi sur ŝtata nivelo, por ke la Esperanto ne estu elektebla lingvoekzameno. Mi tiam serĉis la tiaman parlamentan deputiton, kaj mi skribis al li longan ĉagreniĝan leteron, ke tio estas diskriminacio kontraŭ la neutrala, tutmonde konata kaj parolata lingvo, kiu helpas en la internacia komunikado. Ja kiu parolas en Esperanto, tiu povas iomete kompreni la hispanan, francan, portugalan aŭ italan lingvon. Okaze de miaj eksterlandaj vojaĝoj ankaŭ mi eltiriĝis el la kaptejo helpe de la lingvo Esperanto. La efiko de mia letero estis bonega, ĉar la Esperanto estas ankaŭ plue elektebla lingvoekzameno. Belega bazlingvo eblas ankaŭ por la geknaboj la Esperanto, kiu pli facile ebligas la ceterajn lingvojn”.*

### **Marinjo Töröcsik estis sia samklasano.**

Ni rigardas la plej karajn memorbildojn de Elinjo, kaj ni trovis foton, kie ŝi videblas kun Marinjo Töröcsik. Ŝi fabelis: *„Ni estis dum 4 jaroj samklasanoj, kaj niaj interrilatoj estis tiel forta, ke ekde tiam ĉiujare tenas la klasrenkontiĝon. Marinjo jam kiel knabineto povis ŝajni, ke ŝi estos aktorino. En la interlecionoj ŝi deklamis al ni, aŭ prezentis diversajn scenojn. Mi*

rememoras pri sceno, kion ŝi ludis tion, ke ŝi ĵus legis en sia ĉambro libron, kiu ege plaĉis al ŝi, kiam policisto sonorigis, kiu kunportis la malbonan famon pri la forpaso de familiano. Jam tiam ege tuŝis min, kiel ŝi kapablis esprimi la emociojn”. Elinjo parolis ankoraŭ pri la komuna memoro kun la Nacia Aktorino.

### **Sia edzo ĉiam apogis ŝin.**

„Mi ŝuldas al Esperanto per danko, por ke mi trairis la 'duonan mondon', kaj mi estas fiera, ke mi povas esti la landa gardisto de la lingvo Esperanto. – diris ridete Elinjo – Al ĉi tio mi bezonis nian amatan edzon, kiu bedaŭrinde ekde kelkaj jaroj ne estas inter ni, sed nia geedzeco estis ege feliĉa. Li apogis min ĉiutempe. Mi povis trankvile partopreni dum kongresoj, kaj mi rajtis vojaĝi kiam ajn al la pentrotendaro”



*Kun la amata edzo*

Sinjorino Elinjo Ködmön en sia libertempo pentras ankaŭ ne kiel ajn. Sur la muro de sia loĝdomo ne havas malplenan spacon, ĉar ĉirkaŭe sur la muro enviciĝas siaj pentraĵoj. Pejzaĝbildoj, portretoj, grafikoj troveblas inter ili. Ĝis nun ŝi havas 61 memstarajn patrolandajn kaj eksterlandajn ekspoziciojn, eĉ ŝi establis la Esperantistan Belartan Rondon. Ŝi organizas la ekspoziciojn kaj pentrotendarojn kun granda pasio. Ne estas malfacila diveni, ke de kie naskiĝas la vivoŝato.

„En mia tuta vivo mi okupiĝis pri tiuj aferoj, kiujn mi ŝatas, kaj en tio mi neniam marĉandadis. Oni diras, ke mi aspektas pli juna ol mia aĝo, kio estas dankebla al tio, ke mi ĉiam trovas novan celon, kaj ĉiujn momentojn de la enkonduka vojo. Ĝuste nun mi vojaĝas al Aŭstrio, ĉar mi ŝatas de tie eternigi la tiean naturon.”

Elinjo ridete adiaŭas, kaj ŝi prenas la fermiteblan pentrostablon sur siajn ŝultrojn, kaj promenas kun tio en la ĝardeno por niaj plaĉoj, por ke ŝi povu montri, kiel okazas tiu penado”.

„Szurovecz Kitti”

Ĝis tie estas la raporto, kaj mi povas konstati, ke Elinjo vere estas multflanka virino, kaj mi povas ankoraŭ rimarki, ke ŝi havas tempon por flegi la ĝardenon, okupiĝi siajn nepojn, bonege kuiri, arte pentri, pentrartan premion gajni, pli ol 60 memstarajn pentrartajn ekspoziciojn aranĝi, daŭrigi altgradan Esperanto-aktivecon kaj ĉiam havi tempon por ĉiuj geamikoj. Mi esperas, ke ankoraŭ dum longa tempo ni povos kunlabori kaj ĝui la eblecon agadi en la komuna societo per Esperanto por Esperanto.

**István Gulyás**

## LA 6-A ESPERANTO-STAĜO EN METABIEF

La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasia regiono en la vilaĝo *Metabief* proksime de la svisa landlimo. La aranĝon organizas la klubo



*Partoprenantoj de la staĝo*

de "Esperanto *Chalonnais*" sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de la tutmonda pandemio COVID-19 (kronviroza malsano 2019).

Ni loĝis en montara junulara gastejo *Les Sapins de l'Amitié* (La abioj de Amikeco), kiun prizorgas la asocio *Claj* (*Clubs de loisirs et d'action de la jeunesse*). La direktoro Djemel Zeffane afable bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj kondiĉoj pro la Kronviruso. Ni devis uzi maskojn, krom dum la

manĝado kaj dum la instruado. Ekster la domo estis laŭvola uzado de ili.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj poste sekvis prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudektri geesperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La programo konsistis el matenaj kaj antaŭvesperaj Esperanto-kursoj, posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj.

Per diversaj ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo situanta proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.

Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado.

Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atomcentraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sudameriko, mikrokreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. Libroservo proponis Esperanto-librojn. Andreo Grossmann prezentis kajerojn de TAKE pri konstruado.



*Kurso por progresantoj*

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito de la mezepoka kastelo *Fort de Joux* transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metrojn) en Eŭropo. Ne malpli interesa estis vizito al grotoj de *Vallorbe*, situantaj en Svislando. La kavernoj estiĝis pro la subtera elfluo de *Orbe* el la lago de *Joux*. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon *Baud* de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj. Alia interesa vizito gvidis nin al la fromaĝejo Marcel Petite. *Fort Saint Antoine* estas malnova militfortikaĵo transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo *Comté*. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. Impresis altaj stokoj da plurkilogramaj fromaĝ-diskoj. Feliĉe la laboro estas aŭtomatizata.

En la "Domo de la rezervejo" sur areo je 500 m<sup>2</sup> estas instalitaj interagaj ekspozicioj dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas promeni ĉe la lagoj de *Remoray* kaj de *Saint-Point*, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvidejo en alteco je 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En *Métabief* ni vizitis fromaĝejon de *Mont d'Or*, kie oni povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn. Ĵaude ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun



*La fromaĝejo Marcel Petite*

amikino ŝia. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bombonoj "Merci". Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel Desbrières kaj Alexandre André. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.

Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ la Nigra maro. Alian interesan (kvarmonatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigault. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.

Post longa tempo sen fizikaj Esperanto-renkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso.

**Liba Gabalda**

**Rimarko:** Post longa tempo mi denove ricevis raporton pri Esperanto-kunveno, kion mi ege dankas. Dank' al Dio, ke malgraŭ la pandemio, kelkaj entuziasmaj esperantistoj kolektis sian kuraĝon, kaj partoprenis en la Esperanto-staĝo. Mi esperas, ke tiu tendenco daŭros, kaj anstataŭ la elektronikaj "renkontiĝoj" revenos la normalaj kaj kutimaj aranĝaĵoj. Nun estas malfacila kaj embarasa situacio, kiun ni devas transvivi, kaj poste povos veni la normala situacio en la Esperanto-vivo.

**La red.**

# KIAL EŬROPO NE POVAS KONTROLI LA COVID-19

## EPIDEMION?

La epidemio de COVID-19 estas la plej grava krizo en la vivo de nia generacio. Indas do analizi kiel orientaziaj landoj, ĉefe Ĉinio povas sukcese kontroli kaj malgrandigi la epidemion, kaj kial Eŭropo tute ne povas fari tion. En la 17-03-2020 s-ro Peng Zhengming (Trigo) detale analizis la kialojn de la sukceso de Ĉinio en la „El Popola Ĉinio”, kaj nun mi provas klarigi, kiel Eŭropo fiaskas en tiu tereno.

Se ni rigardas la epidemian situacion en diversaj landoj de la mondo sur la retpaĝo <https://www.worldometers.info/coronavirus/> tiam evidentiĝas ke en Orienta Azio Japanio, Koreio kaj Ĉinio sukcese kontrolas la epidemion. En Ĉinio aperis nur 46 novaj malsanuloj hieraŭ, kaj en ĉina urbo Wuhan (kie la epidemio komenciĝis) dum la lastaj tagoj preskaŭ ne estiĝis novaj malsanuloj. Sed en multaj eŭropaj landoj (ĉefe en Italio) centoble pli multaj homoj malsaniĝas dum unu tago. Italio estas relative malgranda lando kompare al grandega Ĉinio, tamen en Italio pli da homoj mortis pro la epidemio dum la lastaj semajnoj, ol en Ĉinio dum la tuta tempo de la epidemio. Estus grave kaj interese kompreni kial okazas tiel?

Laŭ mi la plej grava kialo originas en la multcentjara kultura diferenco inter Eŭropo kaj Orienta Azio. Tio signifas, ke en Orienta Azio homoj estas tradicie obeemaj kaj lojalaj al la registaroj, sed en Eŭropo individualismo gravas. Tio signifas, ke en Eŭropo multaj politikaj partioj, sociaj movadoj kaj tielnomataj „civilaj organizaĵoj” kuraĝigas la loĝantaron protesti kontraŭ la decidoj de la centraj kaj lokaj registaraj ordonoj celantaj kontroli kaj malgrandigi la epidemion. Por klarigi tiun fenomenon mi mencias kelkajn konkretajn faktojn.

- Je la komenco de la epidemio en Lombardio (provinco en Norda Italio) aperis la viruso, kie amase malsaniĝis la loĝantaro. Estis do logika kompreni, ke por malgrandigi la epidemion la provinco devus esti blokita, tamen multaj homoj opiniis, ke ili havas individuan rajton decidi, ĉu ili restu en kvaranteno, aŭ ĉu ili forlasu la provincon. Tiel okazis, ke multaj homoj elvojaĝis el Lombardio, inkluzive s-ron Silvio Berlusconi, iama ĉefministro de Italio. Mi informiĝis en la internacia medio, ke la itala registaro ordonis, ke ĉiuj homoj en Lombardio restu en sia provinco, tamen kelkajn horojn post tiu registara ordono la tuta mondo povis vidi, ke centoj, eĉ miloj da homoj iris al la stacidomo por vojaĝi al aliaj partoj de Italio. La rezulto de tiu agado estis, ke post kelkaj tagoj la viruso aperis amase en la tuta lando. Tie la situacio nun estas netolerebla kaj nekontrolebla. Tiom multe da malsanuloj estiĝas ĉiutage, ke ne estas loko por ĉiuj malsanuloj en la hospitaloj. Pro tio kuracistoj devas decidi kiujn malsanulojn ili akceptu en la hospitalojn, kaj al kiuj aliuloj oni ne donu ŝancon por vivo. Dum la lastaj tagoj tiom multe da homoj mortis, ke oni ne kapablis normale veturigi la mortintojn al tombejoj, sed militistoj faris tion dum noktoj.
- Serioza socia problemo estis kaj estas en Eŭropo la amasa popolmigrado. Tio signifas, ke milionoj da afrikanoj kaj sudazianoj klopodas enmigri la Eŭropan Union, kaj ili havas nek pasportojn, nek aliajn dokumentojn. Sekve de tio neniu povas kontroli, kiuj ili estas, kaj el kiuj landoj ili alvenis. Ili kutime trairas la landlimojn kaŝe dum noktoj. En la jaro 2015 pli ol unu miliono da enmigrintoj alvenis tiamaniere al Eŭropo. La oficiala ŝtatpolitiko de nia lando Hungario estas ke Hungario, same kiel la Eŭropa Unio devas protekti siajn landlimojn kaj pro tio Hungario konstruis dratbarilon ĉe la landlimo. Sed multaj okcidenteŭropaj

kaj skandinaviaj landoj forte kritikis Hungarion pro tio, ĉar ilia ŝtatpolitiko estas akcepti rifuĝintojn kaj enmigrantojn amase. Ankaŭ multaj tielnomataj „civilaj organizaĵoj” kiuj estas finance subtenataj de alilandaj registaroj kaj sociaj fondaĵoj, protestis pro la fermiteco de Hungario. Ili preferus konstrui malfermitan Eŭropan Union sen bariloj. Ankaŭ la plimulto de la parlamentanoj de la Eŭropa Unio samopinias, kaj pro tio ili akceptis eŭropan parlamentan decidon kontraŭ Hungario. Nuntempe, kiam oni ĉiutage devas batali kontraŭ la epidemio, estus serioza tasko de ĉiuj landoj kontroli la internacian migradon, ĉar la kaŝita migrado de nekonataj homoj sen iu ajn kontrolo havas seriozan sanriskon, ili povas kunporti viruson el landoj al aliaj landoj.

- En Hungario la unuaj malsanuloj ne estis hungaroj, sed ili estis studentoj el Irano. Kiam evidentiĝis, ke kelkaj el ili havis la kronviruson en sia korpo, tiam la aŭtoritatoj ordonis, ke ili restu en kvaranteno en hospitalo dum du semajnoj. Sed ili protestis en la hospitalo, sen permeso forlasis la ĉambron, kie ili devis resti, ne obeis la ordonojn de la kuracistoj, eĉ komencis forĵeti seĝojn el sia ĉambro tra la fenestroj. Pro tio oni devis peti helpon de policistoj. Sed eĉ tio ne estis sufiĉa, krom policistoj oni devis peti ankaŭ helpon de la ambasadejo, kaj oni invitis ankaŭ interpretistojn. Ĉar la problemo ne solviĝis, post kelkaj tagoj la kompetentaj aŭtoritatoj ordonis sendi tiujn studentojn vojaĝi hejmen al Irano. Sed la studentoj kontraŭstaris, kaj petis ke civilaj organizaĵoj turnu sin al juĝejo, ĉar ili havas individuan rajton resti en lando kie ili volas.
- La problemo en Eŭropo estas tre serioza ne nur pro malobeemo de ordinaraj homoj, sed eĉ estroj kaj gvidantoj emas malobei la decidojn aŭ proponojn de la registaroj. En Hungario estas fama universitato, kies iama prezidanto estis Nobel.premiita medicinisto, kiu malkovris vitaminon „C”. Temas pri la Szegeđa Universitato, kies nuna prezidanto (en hungara lingvo: rektoro) pasigis tempon en Aŭstrio antaŭ nelonge, kie tiam la epidemio jam disvastiĝis. Pro tio la registaro proponis, ke homoj kiuj pasigis tempon en danĝeraj landoj, do ankaŭ en Aŭstrio, restu izolate en hejma kvaranteno dum du semajnoj. Sed tiu universitata ĉefo ne obeis, li ne restis hejme, sed iris al sia universitato, organizis kunvenojn kun aliaj profesoroj kaj estraranoj, eĉ operaciis malsanulon en sia universitata hospitalo. Post du tagoj evidentiĝis, ke ankaŭ li ricevis la viruson en Aŭstrio. Pro tio nun ĉiuj liaj kontaktpersonoj devas resti en izolitaj lokoj por observi, ĉu ankaŭ ili ricevis la malsanon, aŭ ne.
- Antaŭ kelkaj tagoj la hungara registaro decidis bloki la landon kaj malpermesis, ke alilandanoj eniru Hungarion, celante ke oni protektu la sanon de la hungara popolo. Sed multaj alilandanoj ne emis akcepti tiun decidon, kaj ili amasiĝis ĉe la hungara-aŭstra landlimo. Ili protestis kontraŭ tiu registara ordono kaj postulis, ke la hungaraj landlimgardistoj lasu ilin eniri la landon. Ĉar ili opinias, ke ili havas individuan rajton libere moviĝi el loko al alia loko. La amaso de tiuj homoj kaj iliaj aŭtoj estis 24 kilometra longa, do inter Vieno, la aŭstra ĉefurbo kaj la aŭstra-hungara landlimo ili plenigis la aŭtovojon. Pro tio post unu tago la registaro devis modifi la ordonon, kaj pro humanaj kialoj oni permesis, ke tiuj alilandanoj eniru la landon dum nokto. Ankaŭ Ursula von der Leyen, prezidantino de la Eŭropa Komisiono proponis, ke la hungara registaro solvu tiun problemon humane, do laŭeble lasu eniri tiujn alilandanojn en Hungarion.
- S-ro Peng Zhengming skribis en sia eseo, ke ankaŭ ĉinaj telekomunikaj kompanioj kontribuis al la ĉesigo de la epidemio. Ĉar kun datumbazo de 1,6 miliardoj da saĝtelefonoj de Ĉinio, tiuj kompanioj povis koni homfluojn en provincoj kaj urboj.

Tiuj datumoj helpis la lokajn registarojn antaŭvidi la direkton de epidemia propagiĝo kaj alpreni taŭgajn rimedojn. Tiu entreprena-registara kunlaboro estiĝis utila en Ĉinio por batali kontraŭ la epidemio. Sed laŭ la tradicia eŭropa pensmaniero ankaŭ tia kunlaboro ne povas okazi en Eŭropo. En Hungario ekzemple la registaro volis pliefikigi la publikan administradon antaŭ multaj jaroj, kaj pro tio donis personan identigilan numeron al ĉiuj civitanoj. Oni pensis, ke tiamaniere ĉiuj ŝtatoficejoj povas facile kaj simple identigi la civitanojn. Sed poste la Konstitucia Kortumo (la plej alta kortumo en Hungario) nuligis tiun registaran decidon, dirante, ke en tiu kazo homoj ne povas konservi privatecon. Kaj konservo de privateco estas grava individua rajto de homo laŭ tiu kortuma decido. Sekve de tio ekde tiam la diversaj ŝtatoficejoj (ekz. impostoficejoj, landregistraj oficejoj, publikaj sekurecaj oficejoj ktp) devis krei siajn proprajn identigilajn numerojn por ĉiuj civitanoj.

- Nuntempe estas kutime havi videokamerojn en multaj publikaj lokoj preskaŭ ĉie en la mondo. Sed en Hungario parlamenta oficisto (nomata „ombudsman”) dum longa tempo malpermesis, ke oni uzu tiujn videokamerojn en publikaj aŭtobusoj. Ĉar li opiniis, ke en tiuj aŭtobusoj homoj ne povas konservi privatecon, do ili ne povas kaŝi sin, se ili volas kaŝite vojaĝi. Sed mi vidis, ke en Ĉinio ankaŭ videokameroj estis utilaj en la batalo kontraŭ la epidemio. Ĉar kiam aperis nova malsanulo, tiam oni pli facile povis trovi siajn kontaktpersonojn, kun kiuj li kune vojaĝis en la sama aŭtobuso. Tiamaniere oni povas efike malgrandigi la epidemion kaj savi la vivon de multaj homoj en Ĉinio.

En tiu situacio videblas, ke oni tute ne povas ĉesigi la epidemion en Eŭropo tiel efike, kiel Ĉinio povis fari. Nun multaj eŭropaj gvidantoj emas akcepti tiun situacion. Ili pensas, ke en Eŭropo la epidemio ne estos ĉesigebla en la proksima estonto. Laŭ prognozo de la Robert Koch Publika Saninstituto Angela Merkel, gvidantino de Germanio anoncis, ke antaŭvideble 60-70%-j de la eŭropa loĝantaro malsaniĝos pro la kronvira epidemio dum la venontaj du jaroj. Tio signifas, ke pli-malpli tricent milionoj da homoj malsaniĝos en la Eŭropa Unio (kun Britio) dum la venontaj du jaroj kaj multaj milionoj mortos.

Mi konkludas, ke laŭ la tradicia individualisma eŭropa pensmaniero oni emas protekti multajn homajn rajtojn (konservo de privateco, homaj rajtoj por libera vojaĝo, ktp) sed oni forgesas, ke la plej grava homa rajto estas la rajto por vivo. Kaj en tiu situacio multaj homoj, kiuj mortis, mortas kaj mortos pro la epidemio, ne povis, povas kaj povos havi sian plej gravan rajton, la rajton por vivo.

### **D-ro Gábor Márkus**

Prezidanto de Eŭrazia Kultura Centro kaj  
Honora prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio

**Rimarko:** Tiu ĉi artikolo pretiĝis antaŭ du monatoj, sed tiuj konstatadoj ankaŭ nuntempe estas veraj. Mi scias, ke la situacio de la virusoj preskaŭ ĉiutage ŝanĝas, tamen la temo estas ege aktuala. Do legu tiun ĉi artikolon kun granda atento kaj observu la instrukciojn de la kuracistoj kaj la ŝtato. Nun la plej grava estas gardi la sanon, por ke post la pandemio ni ĉiuj povu daŭrigi la Esperanto-aktivecon.

**La red.**

# HISTORIO DE LA HUNGARA FERVOJISTA

## ESPERANTO – MOVADO

### (DUA PARTO)

En la pasinta numero de nia fakrevuo Hungara Fervojista Mondo mi komencis aperigi artikolon pri „Historio de la Hungara Fervojista Esperanto-Movado”. Mi decidis, ke la historion mi aperigas sinsekve en kelkaj numeroj de HFM. En la pasinta numero de HFM mi skribis pri la periodo inter 1896 ĝis 1915, kaj parte la periodon inter 1915 ĝis 1955, kiun mi nun daŭrigas.

#### Daŭrigo de la periodo 1915 – 1955

Post longa kaj persista laboro en 1956 oni sukcesis fondi memstaran fervojistan Esperanto-grupon en urbo Debrecen. La fondintoj estis Lajos Takács fervoja inspektoro, Ambrus Tóth (1899-1993), József Mátyás (1923-1995) k.a. Post la fondiĝo de la grupo



*D-ro István Bácskai*

rapide disvastiĝis Esperanto inter la fervojistoj, kaj ĝi rezultis fondi plurajn fervojistajn fakgrupojn. En tiu organiza laboro multaj fervojistoj elstaris, inter ili D-ro Imre Pethes (1930-2018), János Jurányi (1900-1974), Lajos Dér (1910-1974), Lajos Korsós, Antal Járó (1924-2008), Ferenc Egry (1896-1985), István Temesi (1925-2006), István Pál (1926-2012), Lajos Kapitány (1911-1988) k.a. Malgraŭ tio, ke multaj fervojistoj fariĝis esperantistoj, fondis esperantajn grupojn, societojn, tamen la hungaraj fervojistaj esperantistoj ne havis propran organizaĵon. En 1957 la Kultura Ministerio aprobis establi la „Hungaran Esperanto-Konsilantaron” (HEK), en kies kadro la 15-an de septembro formiĝis la „Fervojista Sekcio”. Tiel ekde la jaro 1957 laŭleĝe funkcias la Fervojista Esperanto Movado en Hungario. La fondinto estis D-ro István Bácskai. Samtempe la fervojistaj esperantistoj elektis prezidantaron sub la gvido

de D-ro István Bácskai. La membroj de la prezidantaro estis D-ro Imre Pethes, Lajos Kapitány, Simon Csóra, Pál Kristek, Pál Garamszegi ktp. La plej grava rezulto estis tuj la oficiala ekfunkciado de la fervojista Esperanto-movado, ke establiĝis multaj fakgrupoj ĉe MÁV en ĉi tiu periodo ĝis la jaro 1962. Tiuj fakgrupoj estas:

- Centra Fakgrupo Budapeŝt sub gvido de D-ro István Bácskai (1957). Tiu fakgrupo direktis la tutan fervojistan movadon en Hungario;
- Fervojdirekcio Budapeŝt (sub gvido de Béla Anka, 1957);
- Eduka Fervojinstituto Békéscsaba (Gyula Kovács, 1957);
- Eduka Fervojinstituto Kaposvár (Erzsébet Vilisits, 1957);
- Eduka Fervojinstituto Kőszeg (Istvánné Borsodi, 1957);
- Eduka Fervojinstituto Szeged (Nándor Vad, 1957);
- Fervojstacio Hódmezővásárhely (Lajos Korsós, 1957);
- Vagonriparejo Miskolc (István Pál, 1957);

- Eduka Fervojinstituto Répceszentgyörgy (Pál Nagy, 1957);
- Vagonriparejo Debrecen (Ambrus Tóth, 1958);
- Fervojdirekcio Miskolc (Lajos Zsiga, 1958);
- Vagonriparejo Dunakeszi (Lajos Kapitány, 1959);
- Fervojstacio Nyíregyháza (Antal Járó, 1959);
- Fervojstacio Békéscsaba (János Valastyán, 1960);
- Fervojstacio Kecskemét (István Bálint, 1960);
- Fervojstacio Debrecen (Lajos Takács, 1961);
- Fervojstacio Dombóvár (D-ro György Gyöngyösi, 1961);
- Vagonriparejo Székesfehérvár (Dénes Szalai, 1961);
- Deponejo Győr (Mária Kolbai, 1962);
- Fervojstacio Cegléd (István Kis-Kalmár, 1962);
- Fervoja Hospitalo Pécel (D-ro Imre Ferenczy, 1961);
- Fervojdirekcio Szeged (Péter Turzó, 1962);
- Fervojstacio Szolnok (László Balázs, 1962);
- Vagonriparejo Szolnok (József Nagy, 1962);
- Fervojstacio Vésztő (Géza Szili, 1962).

Tiel en la periodo 1956-1962 entute 26 fervojistajn fakgrupojn oni fondis kun pli ol 1500 membroj.

Eksterordinare grava paŝo de nia faka movado estis la partopreno en la 9-a Internacia Fervojista Kongreso en Rijeka en 1957, kaj tie la internacia kontakto kun la reelektita estraro de IFEF. Tiu evento donis la rezulton, ke en 1959 la hungaraj fervojistaj esperantistoj aliĝis al IFEF kun 30 membroj kaj en la jaro 1961 jam kun 103.

En la jaro 1957 ankoraŭ okazis grava evento, kiam aperis la unua numero de la ilustrita kvaronjara faka revuo la „Hungara Fervojista Mondo” (HFM). Tiu ĉi revuo seninterrompe aperis, eĉ nuntempe ĝi regule aperas. La fondinto kaj respondeca eldonanto, respektive respondeca redaktoro estis D-ro István Bácskai. En la redaktado sekvis lin Simon Csóra, Pál Kristek (1920-1993), Ferenc Phersy, János Patay (1929-2015) kaj Inĝ István Gulyás. En 1984 Inĝ István Gulyás transprenis la respondecan redaktadon kaj la eldonadan taskon, kiujn li ankoraŭ nuntempe faras tiujn taskojn.

Ankaŭ estis grava rezulto, ke en la jaro 1961 la klariga teksto de la oficiala fervoja horarlibro de MÁV – krom kelkaj fremdlandaj lingvoj – aperis en Esperanto ĝis la jaro 2003.

Dum la kvindekaj jaroj la hungara fervojista Esperanto-movado rapide disvastiĝis, de tempo al tempo havis sufiĉan forton, rezultojn kaj akiris reputacion en- kaj eksterlande. La hungara registaro rekonis la bonan laboron de la fervojistaj esperantistoj, kaj pro tio konsentis organizi IFEF-kongreson en Hungario.

## **Periodo 1962 – 1982**

En la jaro 1962 inter la 5-a kaj 11-a de majo okazis la 14-a IFEF-kongreso en Budapeŝto. La Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj la helpantoj havis grandan zorgon kaj neimageble multan laboron, ĉar la kongreso estis planita por 500-600 partoprenantoj el 18 landoj,

sed fakte aliĝis 1061 el 20 landoj, kaj partoprenis 1004 esperantistoj el 17 landoj. La ĉefprotektanto estis István Kossa (1904-1966), la ministro de trafiko kaj poŝto, jam antaŭe delonge esperantisto. Pliaj protektantoj estis la Fervojista Sindikato, la Ĝenerala Direkcio de pluraj regionaj Fervojdirekcioj. LKK konsistis el la sekvaj: D-ro István Bácskai



*Kongresanoj kun la ministro Kossa, kaj verkisto Baghy*

(prezidanto), Lajos Kapitány (vic-prezidanto), D-ro Imre Pethes (sekretario), Simon Csóra (ĉiĉerono), D-ro Endre Tarnay, Béla Anka, Pál Garamszegi, Szilárd Bálint (1909-1995) respondeculoj pri konkretaj taskoj. Okaze de la kongreso jam ĉe la landlimo

esperantistaj helpantoj akceptis la trajne alvenintajn kongresanojn por helpi, informi ilin pri la aktualaj novaĵoj kaj taskoj. Per laŭtparoliloj oni esperantlingve bonvenigis la alvenintajn kongresanojn ĉe la stacidomoj. Kaj la landlimaj kaj la budapeŝtaj stacidomoj, respektive la impona novkonstruita kongresejo kaj la fervojaj oficejoj estis ornamitaj, dekoraciitaj per la kongresa emblemo, hungaraj kaj esperantaj flagoj, aktualaj sloganoj: „La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn”, „Per Esperanto por paco”, „Esperanto estas simpla, bela aktuala, moderna lingvo por moderna homo”.

La alvenintaj kongresanoj ricevis riĉan kongresan pakaĵon enhavante la kongresan dolumentaron, prospektojn, kongresan libron, tekston de la fakprelego, informojn pri la kongresajn aranĝojn, porokazan poŝtmarkon kaj ceterajn memoraĵojn pri Hungario. Aperis porokaza poŝtkarto, surloke funkciis poŝtoŝtanco uzanta specialan stampilon. Ĉiu kongresano ricevis senpagan vojaĝbileton por tutlanda reto de MÁV – validan por la 1-a klaso – eĉ ĝi validis por ĉiuspecaj urbaj publikaj veturiloj.

Elstara programo de la kongreso estis la Amika Renkontiĝo por la junularo, kiam estis elektita la „Internacia Komitato de Junuloj” por helpi, organizi la venontajn junularajn aranĝaĵojn, agadojn. Ĝia prezidanto fariĝis D-ro Imre Ferenczy, liaj kunlaborantoj estis Inĝ József Cziboly (1936-2013), Inĝ István Gulyás kaj Lajos Csonka (1928-2006).

La kongresanoj amase partoprenis la laborkunsidojn. Tiuj okazis kun granda interesiĝo, same la ĉefa fakprelego sub titolo „Evoluo de longrelaj kaj senbreĉaj trakoj en Hungario”. La preleganto estis Inĝ László Boronkai, kaj li uzis lumbildojn kaj desegnaĵojn ĉe la klarigoj.

Okazis tuttaga ekskurso per aparta trajno al urbo Miskolc, kaj de tie per aŭtobusoj al Aggtelek, kie estis lokigita sur la muron de la fama stalaktitgroto impona dulingva marmortabulo (vidu sur la frontpaĝo) por rememorigi la unikan grotan koncerton okazintan dum la 14-a IFEF-kongreso. Tiun marmortabulon ankaŭ nuntempe videblas en

la granda halo de la groto. La duontaga ekskurso okazis en Budapeŝto, kie en sunbrila vetero la kongresanoj ĝuis la etoson de nia ĉefurbo, kaj poste okazis ŝippromenado sur la rivero Danubo. Okazis diversaj altkvalitaj kulturprogramoj per famkonataj artistoj, kantistoj, dancistoj, orkestroj ktp.

Dum la solena fermo la prezidanto de IFEF akcentis: „Nun venis por ni la plej malfacila momento de la tuta kongreso: por fermi la ĝis nun plej grandnombran, bonsukcesan IFEF-kongreson, kaj en la nomo de la partoprenantoj esprimi varmkorajn dankojn al ĉiuj, kiuj laboris por la kongreso kaj helpis, apogis ĝian sukceson”. Li konstatis ke tiu kongreso fariĝis „*Kongreso de la entuziasmo*”.



*Eminentuloj en la budapeŝta Fervoja Klubo*

La 14-a kongreso de IFEF donis novan energion al la hungaraj fervojistaj esperantistoj, kiuj en- kaj eksterlande efektivigis multan laboron, kaj ricevis honorojn. Károly Rödönyi (1902-1995) ministro de trafiko kaj poŝto – pli frue li estis la ĝeneraldirektoro de MÁV - prezidanto de UIC (Union Internationale de Ĉemins de FER

– Internacia Fervoja Unio) – ĉiam estis subtenanto de Esperanto. En Maribor (1971) li estis elektita membro de la Honora Patrona Komitato de IFEF.

Inter la 1965-1980-aj jaroj la Hungara Esperanto-Asocio (HEA) laŭeble ĉiujare aranĝis simpozion en urbo Gyula sub la nomo „Somera Esperanto-Universitato”. Multaj interesiĝantoj partoprenis ĝin eĉ el eksterlandoj, ja altkvalifikaj eminentaj esperantistoj, universitataj profesoroj prelegis, inter ili ankaŭ kelkaj hungaraj fervojistaj esperantistoj. La asembleo de la Hungara Esperanto-Asocio por la 1963-1965-jara periodo elektis al si ĉefsekretario nian kolegon Lajos Kapitány, fervojan inĝenieron. Li bonege plenumis tiun taskon kaj akiris grandan reputacion al la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Tiutempe en Budapeŝto funkciis speciala fervojista Esperanto-Klubo. Dum longaj jardekoj ĝi estis fama eĉ eksterlande, ja ĝi daŭre havis altnivelajn praramojn, altrangaj personoj prelegis, ekz. D-ro Kálmán Kalocsay, Julio Baghy, Lajos Kökény, Alfonz Pechán (1902-1994), krome multaj eksterlandaj famuloj, ekz. W. Bormann el Germanio, Petro Poliŝĉuk el Uzbekio, eĉ la prezidanto de UEA Ivo Lapenna (1909-1987), ĝenerala sekretario de UEA D-rino Flóra Szabó-Felső, kaj multaj ceteraj. Ĉiusemajne 60-100 interesiĝantoj vizitis la klubon.

(*Daŭrigota*)

**István Gulyás**

## VIRINO KAJ VIRO

Kio estas diferenco inter la virino kaj viro rilate al diversaj situacioj? Ni ekzamenas la plej gravajn okazojn kaj situaciojn pri tiuj temoj:

Rilate al **mono**: La viro pagas 10 Eŭrojn por objektoj valorantaj 5 Eŭroj, ĉar li bezonas tion.

La virino pagas 5 Eŭrojn por objektoj valorantaj 10 Eŭrojn, sed ŝi ne bezonas tion, sed ŝi havas rabatvendon;

Rilate al **banĉambro**: La viro havas 7 objektojn en sia banĉambro: dentbroson, dentpaston, razilon, razŝaŭmon, ŝampon, sapon kaj viŝtukon.

La virino havas meznombre 137 objektojn en sia banĉambro, sed la viro povas ekkoni el ili maksimume 20 objektojn;

Rilate al **aĉetado**: La virino volas aĉeti veston, kaj elektadas en dek butikoj, sed fine ŝi reiras al la unua butiko kaj ŝi aĉetas tiun veston, kiun ŝi je la unua fojo rigardis. Hejme denove surprovas la aĉetitan veston, kaj kompreneble tio jam ne plaĉas al ŝi, kaj tion ŝi reportas al la butiko, kaj la elektado komenciĝas denove.

La viro aĉetas veston en la unua magazeno, eĉ sen provo, nur li rigardas la numeron de la vesto laŭ la grandeco;

Rilate al **diskutoj**: En ĉiu diskuto estas la lasta vorto por la virino. Ĉio, kion poste la viro diras, tio estas la komenco de pli nova diskuto;

Rilate al **estonto**: La virino maltrankviliĝas pro sia estonto ĝis la edziniĝo.

La viro neniam maltrankviliĝas pro sia estonto ĝis tiam, kiam li edziĝas;

Rilate al **sukceso**: La viro estas sukcesa, se lia salajro estas pluraj, kiel sia edzino povas elspezi.

La virino estas sukcesa tiam, se ŝi trovas tiun viron;

Rilate al **geedzeco**: Se virino edziniĝas al viro, ŝi esperas, ke la viro aliĝos, sed la viro ne aliĝos.

Se viro edzinigas virinon, kaj li esperas, ke la virino ne aliĝos, tamen la virino aliĝos;

Rilate al **vestado**: La virino ŝanĝas siajn vestojn konvene al la okazo aparte al la aĉetado, al la akvumado de la floroj, al la malplenigo de la malpuraĵoj, al la telefonado, al la librolegado kaj al la eliro por la poŝtpakaĵo.

La viro ŝanĝas siajn vestojn konvene al la okazo, se li devas iri al geedziĝo, aŭ entombiga ceremonio;

Rilate al **posteuloj**: La virino ĉion scias pri siaj geknaboj. Ekz. kiam devas iri al la dentkuracisto, pri la amindumado, kio estas la plej favorata manĝaĵo, de kiam ili havas timon, esperon, sonĝon ktp.

La viro – kvankam malklare – scias pri iaj homoj, kiuj loĝas en sama loĝejo.

La **penso** de la hodiaŭa tago: Edziĝinta viro forgesu siajn pekojn, ĉar ne estas bezonata, ke en sama mastrumado du homoj memoru pri samaj aferoj.

István Gulyás

## EKSKURSO AL ESTONIO



Kvar ne disigeblaj amikoj decidis viziti Estonion, kiu estas unu el la baltaj landoj. Ĉar ili estas iomete junaj fervojistoj kaj ankoraŭ ne estis en tiu lando, ili petis de mi konsilon pri la vojaĝeblecoj, pri la vizitindaj vidindaĵoj kaj kompreneble pri la estona fervojo. Mi jam vizitis Litovion, kiam mi partoprenis la 90-an Universalan Kongreson de Esperanto en la litova ĉefurbo Vilno. Do mi multe legis antaŭ la kongreso pri la tri baltaj landoj, kaj mi proponis al ili, ke unue vizitu la plej nordan landon inter la baltaj landoj, do Estonion. Ili akceptis mian proponon kaj dum du semajnoj vizitis ĝin, kaj ili vojaĝis al kaj en Estonio per flugiloj, trajnoj, aŭtobusoj, bicikloj eĉ piede.

Estonio estas nordeŭropa lando, kiu situas sur la bordo de la Baltika maro. Ĝi estas unu el la baltikaj landoj, kiun limas norde kaj okcidente la Baltika maro, oriente Rusio kaj sude Latvio. La historio de Estonio estas varia ekde la glacia periodo ĝis la dua mondmilito. Diverskulturaj popoloj ekloĝis sur la teritorio, poste piratoj pereigis la landon, kaj venis la danoj kaj svedoj, fine la rusoj. En 1917 la lando atingis sendependecon, sed tiu stato ne tenis longe, ĉar la lando estis aneksita al Sovetunio en 1940. Dum la dua mondmilito Estonion okupis la germanoj, kaj poste ĝi iĝis unu el la respubliko de Sovetunio. En tiu tempo multajn loĝantojn deportis la rusoj, kaj sur iliaj lokoj la rusoj loĝigis rusianojn. En la fino de la 1980-aj jaroj Estonio disŝiriĝis el la disfalinta Sovetunio, kaj en 1991 ĝi denove gajnis sendependecon. Estonio aliĝis al la NATO en 2003, kaj en 2011 al la Eŭropa Unio. La lando enkondukis en 2011 la Eŭrojn kiel ŝtata pagilo.

La lando havas 1,3 milionojn da loĝantoj, kaj havas 45,2 km<sup>2</sup> teritorion. Do laŭ tio la loĝdenso estas iomete malalta. Estonio estas malgranda lando, sed la kolonioj estas eĉ malpli altaj. Kaj la urboj kaj la vilaĝoj estas puraj kaj bele konservadaj ne nur la historiaj monumentoj, sed la tutaj kolonioj. Estonio estas mirinda lando.



*Talino el flugperspektivo*

Ĝi havas netuŝitajn insulojn, interesajn marĉojn, malgrandajn akvofalojn, ĉarmajn fiŝistajn vilaĝojn, faman ĉefurbon, purecon kaj karajn homojn. En la lando ĉio estas verda, kaj ĉi tie oni ne bezonas rapidecon. La naturo ĉirkaŭas la homojn, kaj obsedas ilin la varia formo de la vidindaĵoj. Estas bona afero ripozi en la marĉregiono, baniĝi en la maro, aŭ promenadi en la malnova urbocentro de la ĉefurbo.

La ĉefurbo de Estonio estas Talino. Ĝi havas pli ol 420 mil loĝantojn, kaj estas la centro de la kulturaj, instruadaj, politikaj, financaj, komercaj kaj ekonomiaj aktivecoj en la balta regiono. La historia urbocentro estas ekde 1997 parto de la Monda Kultura Heredaĵo de Unesko. Malgraŭ la masivaj muregoj ĉirkaŭ la ĉefurbo, tamen dum la jarcentoj la svedoj,

germanoj kaj la rusoj okupis ĝin. La zig-zagaj kaj pavimitaj stratetoj, la mezepokaj komercistaj domoj montras la etoson de la mezepoko. Ankaŭ estas interese kiel la ĉefplacon ĉirkaŭigas mezepokaj loĝdomoj. Ĉi tie troveblas la belega urbodomo, kiu estas la plej bela gotika arkitektura memoraĵo, kiu restis en originala stato. Estas interesa vidindaĵo en la ĉefplaco la malnova apoteko, kiu funkcias ekde 1422. Ankaŭ estas interese la mezepoka Malliberejo kaj la muzeo de Okupadoj. La fama preĝejo de la malnova urboparto estas la Sankta Olav kaj ties 159 metra turo. Multaj famaj konstruaĵoj troveblas en Talino, kiel la Alexander Njevszkij kaj la Sankta Maria katedraloj, la preĝejoj Sankta Spirito kaj Sankta Nikolao, la Marista Muzeo, la Palaco Kadriorg, la Subĉiela Muzeo ktp. La plej bela kaj intima estas la Sankta Katarina pasejo, kiu havas multajn metiistajn metiejojn, diversajn butikojn, kafejojn, restoraciojn kaj multegajn homojn, ĉefe turistojn. En la lando la urba trafiko estas fidinda kaj akurata, kaj estas interesa, ke en la ĉefurbo la amastrafiko estas senpaga, sed nur por la loĝantoj de Talino.



*FLIRT motortrajno en Estonio*

forumajn artaĵojn kaj kompreneble multegajn kafejojn, restoraciojn, drinkejojn ĉefe por la universitataj studentoj.

Parnu estas marborda urbo, kiu havas kuracbanojn, kaj pere de la terapio kaj kuracmetodo multaj malsanuloj resaniĝas. La urbo havas nefalsitan banlokan etoson, grandajn parkojn, loĝdomojn kun balkonoj kaj zig-zagajn stratetojn. Multaj somerumantoj troveblas en la urbo, sed aŭtune preskaŭ malpleniĝas la urbo.

Narva estas la tria plej granda urbo de Estonio kun 65 mil loĝantoj. Ĝi situas apud la rusa landlimo. Ĝi estas industria urbo, kaj 95%-a da la loĝantoj estas rusdevenaj. Ambaŭ flanko de la mallarĝa limrivereto staras du fortikaĵeto, en kiuj troveblas muzeoj.

La Nacia Parko Soomaa estas unu el la ĉefaj naturaj vidindaĵoj. Ĝin enretas flankaj brakoj de la rivero Parnu, kaj preskaŭ la tuta parko konsistas el marĉaĵoj. Tiuj havas rarajn vegetaraĵojn kaj faŭnojn. Inter la malgrandaj lagetoj la vojetoj havas lignajn kovraĵojn, sur kio la vizitantoj povas promenadi sekapiede.

La alia interesa regiono estas la Endla Nacia Parko. Ankaŭ en tiu parko troveblas belega marĉejo, en kies koro staras elvida turo, de kie la vizitantoj enrigardas grandan parton de la parko. La vojetoj kondukas la vizitantojn al la densaj arbaroj kaj al multaj lagetoj, en kiuj oni rajtas baniĝi.

La insulo Saaremaa estas la plej granda insulo en la baltaj landoj, kiu estas ŝatata somerumejo. Ĝia teritorio estas eksterordinare varia, ĉar tie oni povas vidi densajn

Estonio havas kelkajn interesajn urbojn (Tartu, Parnu, Narva), kiuj donas al la vizitantoj agrablajn impresojn, kaj la Naciajn Parkojn (Soomaa kaj Endla) certigas neforgeseblajn travivaĵojn, kaj la plej grandan insulon (Saaremaa), kiu estas ŝatata somerumejo.

Tartu estas universitata urbo kun 100 mil loĝantoj. Ĝi havas pitoreskajn parkojn, kelkajn montetojn, loĝdomojn, kiuj konstruiĝis en skandinava stilo, multajn





**Marmortabulo de D-ro István Bácskai  
en la Esperanto-Parko de Pécs**

**Transponta Esperanto-Kongreso  
germana - pola - fervojista**



**Frankfurt (O) / Słubice  
21-a ĝis la 28-a de Majo 2021**



**La 72-a kongreso de IFEF okazos en la ŝanĝita tempo  
(21. 05 – 28. 05 2021) en la germana urbo Frankfurt(O)  
kaj en la pola urbo Słubice**